



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 9-a de Julio 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Asaf Ĥefec, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Lea Kudevicki, Joela Egozi, Doron Modan

Protokolo de la antaŭa kunsido (11-a de Junio 2018) – publikigita en la retejo.

1. Raportoj (Amri)

- a) Aperis artikoloj pri la AK/PK kaj pri Nitsotsot en la julia n-ro de Revuo Esperanto.
- b) Alvenis la ĉeko de la gastejo en Akko. (Sumo?). Necesas peti kvitancon por la gastoj
- c) La Landa Kunveno estis tre sukcesa. Detala raporto estis verkita kaj dissendita de Amri.
- ĉ) La E-kurso finiĝis, okazis 16 lecionoj, 22 finintoj, - kio estas senprecedenca! Atestoj estis disdonitaj dum la LK. *La Estraro gratulas al la kursgvidanto, Doron!*

2. Pri la klubo kaj aliaj rimarkoj (Lea kaj Joela)

Lea: 1. La prezidento de ELI malfruas tro multe, kaj pro tio la eventoj komenciĝas malfrue. (**Amri:** *en la lasta landa kunveno mi alvenis je la 18:05, kaj helpis ornami kaj organizi la librojn. La programo efektive komenciĝis je la 18:40. En decembro mi antaŭdiris ke mi malfruos ĉar la horo koliziis kun mia kurso en Jerusalemo.*)

2. La estraranoj ne reagis al mesaĝoj. (**Amri:** *mi reagis al ĉiu mesaĝo, se la respondo ne plaĉas, tio estas alia afero.*)

3. La elektoj al la Estraro devas esti personaj, ne blokaj. (**Jehoŝua:** *la elektoj estas blokaj, ĉar neniu petis alie. Ĉiun jaron, laŭ la statuto, oni demandas, ĉu iu deziras individuan baloton. Neniam, ankaŭ ne lastfoje, iu tion petis.*)

4. Lea ne sentas sufiĉan aprezon por sia movada laboro, flanke de la Estraro. (**Jehoŝua:** *fine de la lasta LK mi persone dankis al Lea kaj Joela nome de ELI por ilia laboro.*)

Joela: Mi postulis en la pasinteco, kaj daŭre postulas klare vidi kelkajn buĝetpunktojn, kvitancojn, detalojn, ktp – sed nia kasisto ne reagis. Mi postulas ricevi tiujn informojn ne per retmesaĝoj, sed sur printitaj paperoj. Mi donos al Ŝlomo detalan leteron kun miaj plendoj. (**Ŝlomo:** *listigu ĉiujn viajn petojn, kaj mi alportos ĉion en konsentita tempo kaj loko, dum unu el niaj kunsidoj.*) (**Jehoŝua:** *Ŝlomo ne devas laboregi por persone klarigi al ĉiu membro. Li raportas al ĉiuj dum la LK laŭ la statuto.* **Amri:** *Ŝlomo laboras ege akurate kaj profesie. Li investas multan tempon por respondi ĉiujn postulojn de la Registristo (רשם העמותות) kaj dank' al lia laboro ni lastatempe ricevis konfirmon pri ĝusta laboro (אישור התנהלות תקינה). La plendoj kaj demandoj de Joela tre similas al la plendoj de Jagil (להבדיל), kiujn ni detale respondis en letero al la Registristo. Mi proponos sendi al Joela tiun ĉi respondon.*



3. Dratwerejo (Jehoŝua)

- a) La ĝisnunaj luanĵoj eliris fine de junio, laŭ ilia kontrakto. Jehoŝua ricevis la ŝlosilojn.
- b) Amri aperigis detalan anoncon en Jad2 por 3200 NIS lupago. Alvenis ĉ. dek telefonoj.
- c) Jehoŝua montris la apartamenton al pluraj interesiĝantoj. Li modifiis la kontrakton tiel, ke eblos ĝin subskribi kaj mane plenigi la detalojn.
- ĉ) Lunde 9.7e Jehoŝua kaj Amri montris la apartamenton al pliaj telefonitoj. Unu el ili, Ŝlomi, kun edzino, surloke subskribis la kontrakton por eniri la 15-an de julio. Ĉar ili ne havis ĉe si ĉekojn aŭ monon, estis interkonsentite ke ĝis la eniro ili ordigos la pagojn kaj ĉekojn kun Amos Ŝapira, kiu anstataŭos Jehoŝua. *Voĉdono por aprobi la luadon en tiuj cirkonstancoj: ĉiuj por, krom Matilda, kiu sindetenis.* [Aldono: telefonis kaj rezignis du tagojn poste. Amri respondis ke li eble devos kompensi ELI pro la damaĝo, ĉar li subskribis leĝan kontrakton. Jehoŝua kontaktis alian interesiĝanton, Sergej, kiu daŭre volas sed por 3000 NIS. Dimanĉe 15.7 Amos montros al ili la apartamenton].

4. Oficejo (Amri)

- a) Amri trovis en Jad2 anoncon kun tre bonaj datenoj: vojo Begin 74 (Maariv-kruciĝo), en Bet Moja, 565 mil sikloj +vat, 40 kvadratmetroj, du ĉambroj dividitaj per gipsa muro. Amri fiksas kun la peranto rekontiĝon lunde (hodiaŭ) kaj kun Jehoŝua vizitis la oficejon. Ĝi estas renovigita. Eblos luigi ĝin, sub niaj kondiĉoj (ke ankaŭ ni uzu ĝin vespere). Ili sukcesis jam malaltigi la prezon al 560 mil NIS, sed estas ankoraŭ diversaj elspezoj, kiel aĉet imposto, pago por makleristo, ktp. Ĝi tre taŭgas al ni el ĉiuj vidpunktoj!
- b) Amri informiĝis kun sia nevino, kiu estas hipoteka specialistino, pri la bezonataj dokumentoj (ĉe banko Leŭmi): financaj raportoj 2016-2018, statuto de ELI, lu-sumo, persona respondeco de estraranoj.
- c) Amri proponis serĉi inter la membraro homojn kiuj emas investi iom ajn sumon persone kontraŭ kontentiga interezo. Ankaŭ Ŝlomo trovis bankon (Mizraĥi) kiu pretis involviĝi.
- c) Se montiĝos taŭga, necesas tuj subskribi aĉetan kontrakton helpe de advokato kaj prizorgi la hipotekon.
- ĉ) Amri skribos al la membroj kun la ĉefaj punktoj, por ke ili povu reagi antaŭ la ev-a subskribo. En tiu mesaĝo eblas ankaŭ peti financon subtenon [farita].
- d) Amri: tiu oficejo ŝajnas taŭga el pluraj vidpunktoj: prezo, situo, grandeco. Por ne maltrafi ĝin, necesas povi rapide subskribi, se ĉio montriĝos taŭga. La diskuto pri la diversaj vidpunktoj daŭriĝos rete.
- e) Ŝlomo: ni devos nomi 3 advokatojn, kaj elekti elinter ili la plej taŭgan. Li petas protokoli, ke ni NE traktas la oficejon en Bat Jam kiun li proponis.
- Voĉdono: daŭrigi la traktadon. Estis nomita teamo kun Amri, Ŝlomo kaj Eran kiu plu traktos kaj havos rajtigon subskribi kontrakton por aĉeti la oficejon. Aprobite unuanime!* [Aldono: en la du sekvaj tagoj Amri intense traktis la aferon, kun la peranto kaj du advokatoj (ĉefe Ram Modan). Adv. Modan havas kolegon kiu posedis oficejon en la sama loko kaj asertis ke devas esti granda renovigo de la domo, kiun devos pagi la posedantoj,

3/...



sekve la prezo devos enkalkuli tion kaj esti signife malpli alta. La peranto diris ke la vendisto neniel konsentos por tia propono. Sekve de la mesaĝo al la membroj, Amir Naor intervenis, kaj skribis mesaĝon kun pluraj rezervoj kaj atentigoj, i.a. oni devas esti tre atenta antaŭ ol devontiĝi por tiom alta elspezo. Eble "Bet Haamutot" kiu situas proksime suficôs (150 NIS por ĉiu fojo). Ankaŭ venis neniuj reagoj al la propono ke membroj pruntu parton de la mankanta sumo (ĉ. 300,000 NIS) kaj ankoraŭ ne estas certa ĉu iu banko donos hipotecon. Sekve de ĉio ĉi, Amri decidis haltigi la negocon kun la peranto kaj prokrastis la renkontiĝon kun la vendanto, jam fiksitan por ĵaŭdo.]

5. IK-20 Eilat+Akaba (Amri)

- a) Informado IK-20+MONA-kunveno (Renato siatempe proponis nomi ĝin MONA-kunveno kaj ne 12-a Mezorianta Kunveno. Nun evidentiĝas ke la 12-a Mezorianta Kunveno fine okazos en Irano en Marto 2019).
- b) Por reklami dum la UK en Lisbono Amri fiksas provizorajn prezojn kaj por la kunvenoj, kaj por la ekskurso (po 150 eŭroj por ĉiu kunveno).
- c) Amri rezervos en Club-Inn Eilat kaj en Akaba.
- ĉ) Reta aliĝilo (Dror) – devas esti preta por la UK en Lisbono.
- d) Renato kaj Amri reklamos en Lisbono.

6. UK Lisbono (Amri)

- a) Amri rerezepntos ELI kaj reklamos la IK-on en la Movada Foiro, la Komitato, kaj la kunvenoj de KAEM kaj MONA.
- b) Amri redaktas kaj eldonas la IKU-libron (prelegeoj de la Internacia Kongresa Universitato) en Israelo. Ĝi estos presita en nia presejo en Haifa.

7. Kursoj (Doron)

- a) Daŭriga kurso por la kursfinintoj – ili petas, kaj pretas pagi! Doron esploros, kiom ili estos en aŭgusto, kaj kiom ili pagos. ELI pagos al Doron la diferencon.
- b) Elementa kurso por pliaj novaj interesiĝitoj (reklamado). Doron ne povos instrui du kursojn paralele, do la nova elementa kurso komenciĝos nur post la fino de la daŭriga kurso.

8. SOmerFlina renkontiĝo: la 27/8-an en kafejo “AlterNativ”. Venos reta alvoko.

La venonta kunsido: 3-a de Septembro 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi kaj Amri Wandel